BEL informas

n-ro 7/2016

la 27an de julio 2016

27 de julho de 2016

Nitra: Komitatano A anstataŭota

Nitra: Komitatano A substituído

Okazas ĉi-semajne la 101-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Nitro, Slovakio. Kiel kutime, en tiu kongreso Universala Esperanto-Asocio (UEA) okazigis ĉefkunvenon kaj specifajn kunvenojn kun la komitatanoj reprezentantaj la landajn asociojn aŭ kun nomumitaj anstataŭantoj, nomataj komitatanoj A. En tiu UK, ĉar ne eblis al nia komitatano A, Rafael Zerbetto, ĉeesti la kunsidon pro lia E-ĵurnalisma laboro en Ĉinio, estis nomumita kaj akceptita kiel anstataŭanto la prezidantino de Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO) Juliana Evandro. Ni dankas al la prezidantino pro la gvidado pri decidoj reprezentante Brazilan Esperanto-Ligon (BEL) dum la kunvenoj.

BEL Informas

Nesta semana acontece o 101º Congresso Mundial de Esperanto (UK), em Nitra, Eslováquia. Como de praxe, nesse congresso a Associação Mundial de Esperanto (UEA) realiza uma reunião principal e reuniões específicas com os comitentes que representam as associações nacionais ou substitutos indicados, chamados comitentes-A. Neste UK, em não sendo possível a nosso comitente-A Rafael Zerbetto a ida ao congresso, por conta de seu trabalho no jornalismo em Esperanto na China, foi indicada e aceita como substituta a presidente da Organização da Juventude Esperantista Brasileira (BEJO) Juliana Evandro. Agradecemos à presidente na condução das decisões representando a Liga Brasileira de Esperanto (BEL) durante as reuniões.

BEL Informas

Nova senpaga virtuala kurso de Esperanto

Novo curso virtual gratuito de Esperanto

Esperanto em 12 dias

https://youtu.be/KJJD1EK8v6k

Disponeblas la nova virtuala versio de la Zagreba metodo, kunordigata de Zlatko Tišljar, kiu uzas la 500 plej oftajn radikojn de la lingvo kaj povas esti la plej rapida kurso de Esperanto. La kurso disponeblas jam en pli ol dek lingvoj:

http://learn.esperanto.com/

Emilio Cid/BEL

Está disponível a nova versão eletrônica do método de Zagreb, coordenado por Zlatko Tišljar, que usa os 500 mais importantes morfemas da língua e deve ser o curso mais rápido de Esperanto. Assista o vídeo com as explicações:

http://learn.esperanto.com/

Emilio Cid/BEL

4-a JRN: sukcese okazis!

4º JRN: sucesso total!

La 26-an ĝis la 29-a de majo 2016 sukcese okazis la 4-a Junulara Renkontiĝo de

Com sucesso, ocorreu entre os dias 26 e 29 de maio o 4º Encontro da Juventude

Nordoriento, en Barra de São Miguel/Alagoas, organizita de Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO). Ĝin partoprenis 13 homoj, ĉe kiuj estis gravaj aktivuloj — junaj kaj plenkreskaj — por pridiskuti la movadon en Nordoriento.

Prelegis unue Querino Neto, ĉeforganizanto, fiska konsilanto kaj reprezentanto de BEJO, kiu parolis pri la agado de junularaj organizoj en kaj ekster Esperantujo. Li ankaŭ parolis pri sia laboro en AIESEC, unu el la plej grandaj junularaj organizoj en la tuta mondo, kiu pridiskutadas komunajn temojn, kiel mondcivitaneco kaj interkomunikado de kulturoj.

Plue prelegis Aristóphio Alves, sekretario de Alagoa Asocio de Esperanto kaj instruisto pri Esperanto kapabligita de Internacia Esperanto-Instituto (IEI), kiu parolis pri sia kariero en la movado kaj la ŝancoj, kiujn li ricevis pro sia aktivado.

Finfine prelegis Liana Dias, verkistino, kiu verkis libron sub la titolo “Amo-libro: la amo unuigis du korojn per Esperanto”, en kiu ŝi rakontas ĉion pri sia amrilato kun alia esperantisto.

La partoprenantoj ankaŭ konis la paradizan belecon de la Gunga Plaĝo, unu el la plej famaj en la ŝtato, kaj havis la ŝancon opinii pri la movado kaj proponi solvojn ĉe gravaj esperantistoj kiel Núbia Sobral (prezidantino de Alagoa Asocio de Esperanto), Wendel Pontes (vicprezidanto de Pernambuka Esperanto-Asocio) kaj Jairo Nunes (kunordiganto de Pernambuka Esperanto-Asocio). Kontrolu fotojn en: https://www.facebook.com/jrnesperanto/

BEJO

Esperantista do Nordeste, na Barra de São Miguel/Alagoas, organizado pela BEJO. Participaram treze pessoas, entre os quais importantes ativistas — jovens e adultos — para discutir sobre o movimento no Nordeste.

Palestrou primeiramente Querino Neto, organizador-chefe, conselheiro fiscal e representante da BEJO, que falou sobre a ação das organizações jovens dentro e fora do movimento Esperantista. Ele também falou sobre seu trabalho na AIESEC, uma das maiores organizações jovens em todo o mundo que trata sobre temas em comum, como a cidadania global e a intercomunicação cultural.

Além dele, palestrou Aristóphio Alves, secretário da Associação Alagoana de Esperanto e professor de Esperanto pelo Instituto Internacional de Esperanto (IEI), que falou sobre sua carreira no movimento e as oportunidades que ele recebeu por seu ativismo.

Por fim, palestrou Liana Dias, escritora que tem um livro chamado “Livro do amor: o amor uniu dois corações através do Esperanto”, no qual ela conta tudo sobre sua relação com outro esperantista.

Os participantes também conheceram a beleza paradisíaca da Praia do Gunga, uma das mais famosas do estado, e tiveram a chance de opinar sobre o movimento e propor soluções, na presença de importantes esperantistas como Núbia Sobral (presidenta da Associação Alagoana de Esperanto), Wendel Pontes (vice-presidente da Associação Pernambucana de Esperanto) e Jairo Nunes (coordenador da Associação Pernambucana de Esperanto). Veja fotos em: https://www.facebook.com/jrnesperanto/

BEJO

Publikigita akademia verkaĵo pri Esperanto

Publicado trabalho acadêmico sobre o Esperanto

A estrutura silábica em esperanto

Karina Gonçalves de Souza de Oliveira

Kiel unua rezulto de magistriĝa laboro aperis “A estrutura silábica em esperanto” (“La silaba strukturo en Esperanto”), akademia verkaĵo de Karina de Oliveira. Karina estas BEJO-ano kaj magistriĝas en la Universitato de San-Paŭlo pri tiu temo. Ŝi bakalaŭriĝis pri Beletro en la sama universitato kaj ankaŭ studas en la postdiplomiĝa kurso pri Interlingvistiko en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando. Karina estas apogata de la apogfonduso al la junulo en Poznano, de BEJO.

Aliru la verkaĵon kaj ties resumon ĉi tie:

http://www.seer.ufu.br/index.php/dominiosdelinguagem/article/view/31839

BEL/BEJO

Como primeiro resultado de uma trabalho de mestrado, foi publicado “A estrutura silábica em esperanto”, artigo acadêmico de Karina de Oliveira. Karina é uma jovem esperantista, membro da BEJO, e está fazendo mestrado na USP sobre o tema. Ela é graduada em Letras pela mesma universidade e também cursa a pós-graduação em Interlinguística na Universidade Adam Mickiewicz em Poznań, na Polônia. Karina é apoiada pelo fundo de apoio ao jovem em Poznań, da BEJO.

Acesse o artigo e o resumo aqui:

http://www.seer.ufu.br/index.php/dominiosdelinguagem/article/view/31839

BEL/BEJO

3-a VINA: aliĝu!

3º VINA: inscreva-se!

Muzikgrupoj, rakontado de historioj, fanzinoj kaj Esperanto atendas vin dum la 3-a VINA. La Vinra Aranĝo de BEJO okazos kune kun la Vintra Festivalo de Parapiakabo!

Sciu pli ĉe nia evento: https://www.facebook.com/events/1788353571394691/

Festival de Inverno de Paranapiacaba terá dois fins de semana

Nos dias 30 e 31 de julho e 6 e 7 de agosto, a Vila receberá música, literatura e cinema

Muzikgrupoj, rakontado de historioj, fanzinoj kaj Esperanto atendas vin dum la 3-a VINA. La Vina Aranĝo de BEJO okazos kune kun la Vintra Festivalo de Paranapiakabo!

Vizitu por pli scii: http://www.facebook.com/vintraarangxo

BEJO

Grupos de música, contação de histórias, fanzines e Esperanto esperam por você no 3-a VINA. O Evento de Inverno da BEJO ocorrerá junto com o Festival de Inverno de Paranapiacaba!

Visite para saber mais: http://www.facebook.com/vintraarangxo

BEJO

Aliĝu al niaj komunumoj ĉe Facebook kaj Google +

BEL invitas: vizitu kaj ŝatu nian paĝon ĉe facebook!

Conecte-se a nossas comunidades no Facebook e Google +

BEL convida: visite e curta nossa página no face!

www.facebook.com/brazilaesperantoligo

Ĉu vi jam realiĝis al BEL ?
Você já se refiliou à BEL ?

Malkovru en via BEL@Butiko

Esperanto para principiantes

Nova edição do famoso curso de Aloísio Sartorato, ricamente ilustrado e com opção

Descubra em sua BEL@Butiko

Por la mondo

CD “Por la mondo”, da banda Merlin, com grandes canções como “Por la mondo”,

de se baixar o áudio em MP3. Compre, aprenda, estude, presenteie. Apenas R$ 30,00. Confira em:

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/esperanto-para-principiantes.html

BEL Informas/BEL@Butiko

“Estas la leĝo”, “Estis unu fojo”, “Bluaj fragoj”, “Mia vojo”, “Mi kredas”, “En ĉi tiu momento”, “Pri la vero”, “Elprovo”. Compre agora este ótimo disco:

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/por-la-mondo.html

BEL Informas/BEL@Butiko

AL BEL-MEMBROJ: POR RICEVI 10%-AN RABATON, PETU VIAN RABAT-KODON ĈE LA ADRESO:

belabutiko@esperanto.org.br

Vizitu vian virtualan butikon:

AOS MEMBROS DA BEL: PARA TER DESCONTO DE 10% NA COMPRA DE LIVROS, SOLICITE SEU CÓDIGO JUNTO AO ENDEREÇO:

belabutiko@esperanto.org.br

Visite a sua loja virtual:

www.belabutiko.esperanto.org.br

Francisco Mattos
belabutiko@esperanto.org.br

Ni laboru kune!

Boletim bilíngue da Liga Brasileira de Esperanto Dulingva bulteno de Brazila Esperanto-Ligo

SDS Ed. Venâncio III Sala 303, Brasília - DF, CEP 70.393-902
Telefones: (61) 3226-1298 Fax: (61) 3226-4446

Kunlaborantoj: Affonso Soares, Ana Ribeiro, Anna Lobo, Antonio Felix, Bert Schumann, Carlos Pereira, Diego Ribeiro, Emmanoel Lima, Emilio Cid, Eurípedes Barbosa, Eduardo Silva, Evandro Avellar, Evandro Caboclo, Fabiano Henrique, Fabio Monteiro, Fabio Santos, Fernando Maia, Flávio Gomes, Francisco Mattos, Joe Bazilio, Juliana Evandro, Lucas Barbosa, Luís Guilherme Jardim, Márcio Santos, Marcus Aurelius Farias, Paulo Nascentes, Paulo Sérgio Viana, Rafael Zerbetto, Walter Fontes, Wesley Jefferson.

Sendu viajn novaĵojn al BEL informas

Ĉu vi deziras kontribui por la dulingva informilo de BEL kaj BEJO sendante novaĵojn? Se jes, bonvole plenigu la formularon per la necesaj datumoj:

Envie as suas notícias para o BEL informas

Você deseja contribuir com o boletim bilíngue da BEL e da BEJO, enviando novidades? Se sim, por favor preencha o formulário com as informações necessárias:

Sendu viajn novaĵojn

Ricevu BEL Informas per via retadreso
Receba BEL Informas em seu email

www.esperanto.com.br/bel